

REDAKTORA VORTO



*

Esperanto-eventoj okazas ĉiujare.
Ĉiuj eventoj okazas per mono – nun ĉefe
per mecenata, antaŭe per propra.
Kiam nenio novas ni ne scias la kaŭzon,
sed se efektiviĝas io – ni scias
dank` al kiu.

En 2010 en Litovio okazis BET
kaj Zamenhof-festo,
aperis tri numeroj de “Litova Stelo”.
Ĉu estiĝos io en 2011? Mi ne scias.
Estas malfacile pensi samtempe pri nuno
kaj futuro – pri prespretaj pliaj numeroj de
LS kaj pri ilia eldono.
Kiu donos la monon por tio?
Ĉu UNESCO?

Organizaĵo kiu nur petas, sed nenion faras
estas bezonata al neniu,
reale eĉ ne al ties gvidanto.
En la okuloj de la gvidanto ni legas:
“Sen mi vi nenion povas,
sed kun mi vi nenion rezultos. Kial mi
devas ion fari – ja mankas la mono”.
Pro kio degeneras E-agado?
Estas eldonitaj stokoj da legolibroj,
sed kiu legu ilin?
Kuŝas stokoj da lernolibroj,
sed kiu lernos laŭ ili? Mankas instruistoj.
La mono estis, la mono forestas.
Elvaporigis.
Ĉu restis nenio?

Restis la espero, ke ĉio ŝanĝigos
kun veno de nova profeto
kaj apero de mono. Kiel bone!
Kiel bone, ke revu ni pretas senpage,
ke neniu malpermesas revu!

*

Fininte la kvinjaran redaktoradon,
Vytautas Šilas /*Vi:taŭtas Ŝilas*

LITOVA STELO

Lietuvos žvaigždė

N-ro 6 (196)

novembro – decembro 2010,
XX jaro

ENHAVO

- 2 Zamenhofa tago
- 4 La destino esti Artokreisto
A. KMIELIAUSKAS
- 9 Mia vojo al Esperanto
V. SKUJIENĖ
- 13 Vojaĝu per Esperanto
D. STATKUVIENĖ
- 21 Letero de leganto
- 22 Rememore pri P. Sitonis
R. RUTKAUSKAS
- 25 Ĉarma itala kongreso
G. OPULSKIENĖ
- 27 Baza E-radikaro
- 28 La litova lingvo eltenis
- 30 E-mozaiko
- 31 Ridetu kune
- 32 Abono al *Litova stelo*

La fotoj
sur la kovrilaj paĝoj –

sur la 1a – de Stasys Paškevičius
sur la 3a – de Stasys Paškevičius
sur la 4a – de Stasys Paškevičius

TRADICIO DE ZAMENHOF-TAGOJ

Per kio al esperantistoj manifestiĝas decembroj? Per Zamenhof-tagoj (festoj)! Ja la kreinto de la lingvo Esperanto Lejzero Ludoviko Zamenhof naskiĝis la 15an de decembro 1859. Ni ne scias ekde kiam esperantistoj komencis festi, celebri la naskiĝtagon de Zamenhof. Tio okazis jam dum la vivo de Zamenhof mem. Jen en la jaro 1909, antaŭtage de la 50-jara jubileo de la Majstro, Vilnaj esperantistoj sendis al li en Varsovion la gratulan telegramon, verkitan de la Vilna poeto Georgij Deŝkin:

*“Hodiaŭ festas tuta mondo,
Ho, Kara Majstro, ankaŭ ni –
De granda mar` malgranda ondo –
Gratulas Vin, ho vivu Vi!”*



Esperantistoj vivtenas festadon de Zamenhof-tago kaj la festado vivtenas E-agadon. Ankaŭ decembre 2010 en kelkcent lokoj de la mondo okazis Zamenhof-festoj. Plej diversaj – modestaj (laŭ la kvanto de partoprenintoj kaj laŭ la programo) kaj solidaj nombre, programe aŭ pro sia oficialeco. La festado okazis en Parizo, Novjorko, Berlino, Sidnejo, Madrido, Kopenhago, San-Paŭlo, Meksikurbo kaj multaj, multaj aliaj urboj. La tagon festis esperantistoj de Urala Rusio (en Jekaterinburg), de Burundo (en Rumonge), de Tajvano (en Pingtung), de nord-orienta Japanio (en Marioka). Sube ni prezentas al vi mozaikan etoson de kelkaj Zamenhof-festoj.

Madrida Esperanto-Liceo por festi la Zamenhof-tagon invitis onin al la ludo-klubejo "da2". Oni renkontiĝis ĉi tie “por kultura, amuziga kaj frata kunveno”. Pri la luado de la ejo zorgis MEL. La manĝado estis memserva; kiu povis, tiu alportis kion ajn por la komuna tablo. La manĝado estis disdividita. La organizantoj anticipis avertis: “Se vi ne povas / emas alporti manĝaĵon, ni faros komunan mendon, kiun pri-pagu la mendintoj. Tute apud la klubejo estas vendejo kie ni aĉetos telerojn, glasojn, manĝilaron, tukon, ktp. Ne necesas ke vi zorgu pri tio. Krome, ni ankaŭ aĉetos tie la komunajn trinkaĵojn (bieron, kolaon, ktp.). Tamen, ekzotaj aŭ specialaj trinkaĵoj estas bonvenaj. Ni disponas ankaŭ je iom da ŝaŭmvino *Esperanto*, kompreneble!” La kunmanĝado ne estis la ĉefa parto de la festo. Okazis prezentado de E-libroj, koncerteto, komuna kantado, poezia festivalo.

Meksika Esperanto-Federacio invitis esperantistojn por varma festado jam ekde 10:30 matene la 11an de decembro 2010. Ĝi okazis ĉe restoracio “Madero” en la centro de Meksik-urbo. La kosto de la matenmanĝo estis \$70.00 (sepdek pesoj) por ĉiu persono kaj inkludis kafon, sukron, fruktojn aŭ jahurton, pecon da dolĉa pano kaj laŭelekte: rostitan bistekon kun “chilaquiles” aŭ kun frititaj terpomoj; “Omleton” kun fromaĝo. Aparte oni kunportis ĉokoladon aŭ tradician meksikan dolĉaĵon por fari interŝanĝon inter la ĉeestantoj. Flanke de MEF okazis tombolo pri esperantaĵoj.

La Pingtung-a E-grupo en la suda **Tajvano** la 18an de decembro 2010 okazigis la Zamenhof-feston. Ĝi pasis en la kunvena ĉambro de kongres-halo de la Pingtung-gubernio kaj ĝin partoprenis ĉirkaŭ 45 esperantistoj kaj simpatiuloj. Inter la ĉeestintoj estis esperantistoj de Usono kaj Sudafriko. La gratulan mesaĝon sendis la prezidanto de UEA P. Dasgupta, la eksprezidanto de UEA R. Corsetti, la prezidanto de Seula Kultur-Centro kaj eksprezidanto de KAEM Lee Jung-kee. Dum la festo, oni elmontris E-lernolibrojn, E-vortarojn, DVD de la unua tajvana Filmo “E-Sha Epoko” kun esperantaj subtitoloj, ktp. Sesopa muzik-bando ludis muzikon pere de tajvanaj muzikiloj.

La 18an de decembro la **Jekaterinburga** E-klubo “Arĝenta flamo” (Ural-Siberia regiono de Rusio) en konferenca salono de la urba hotelo “Granda Uralo” okazigis Zamenhof-feston. Neniu el la organizantoj speciale zorgis pri la ornamo de la ejo, kiel kutime tio okazis antaŭe. Tial oni komencis de la komuna ornamado. Tjumenanoj pendigis surmure siajn murgazetojn pri la klubo, jakaterinburganoj dislokigis laŭ la salono salutvortojn kaj gajan emblemon de la vespero. Iuj pumpis aerglobetojn, aliaj preparis kaj dismetis regalaĵojn por la festa tablo. Tia kunaktivado ekde la komenco donis al la renkontiĝo bonan impulson, unuiginte ĉiujn. Dua parto de la vespero estis pli distra, leĝera kaj gaja. Unuaj elpaŝis novuloj: ili prezentis sin al la cetera publiko, montris preparitajn skeĉojn kaj ŝercojn. Post tio komenciĝis gaja ĉetabla festeno kun tostoj, surprizoj, konkursoj, ludoj kaj tiel plu. Tjumena E-klubo “Revo” donacis al la mastroj portreton de L. Zamenhof, kiu estis akceptita ĝoje kaj tre kontente. Dum la tuta vespero regis plena harmonio inter esperantistoj novaj kaj malnovaj, junaj kaj maljunaj, ĵusbakitaj kaj veteranoj. Tiun etoson ŝajne eksentis ĉiuj kaj ĝi iĝis la plej grava kaj agrabla impresado de la tuta Festo.




Zamenhof-tagon festis ankaŭ afrikaj kaj francaj esperantistoj

En la urbo **Kaŭno** (Litovio) la ĉeestintoj de la tradiciaj Zamenhof-tagoj komence aŭskultis prezidantan raporton de Paŭlo Jegorovas pri aktivecoj de 2010 kaj impresojn pri la Havana UK. Poste la prezidanto onin regalis per senpaga tagmanĝo. Fine, oni ĝuis koncerton de la konata flutistino Lidija (detale en www.esperanto.lt).

LS

La destino esti artokkreisto



Antanas Kmieliauskas
 /Kmelauškas, litova
 artokkreisto, skulptisto, profesoro
 pri desegnado. Jenas lia tre kurta
 biografio. A. Kmieliauskas
 naskiĝis 8-03-1932 en
 subdistrikto Butrimoniai (en suda
 parto de Litovio). Dum la jaroj
 1949-1950 li lernis en Kaŭna Arta
 mezlernejo kaj finis ĝin
 ormedale. Dum 1951-1957 li
 studis en Litova Ŝtata Arta
 Instituto (ekde 1990 rericivinta la
 statuson de Akademio).
 Ekde 1977
 A. Kmieliauskas estis ties
 lektoro, en 1994 profesoro.

Ekde 1957 A. Kmieliauskas partoprenas en artoekspozicioj. Li estas unu el la plej universalaj litovaj artokkreistoj kaj laboras en sferoj skulptura, grafika, bildo-stabla kaj freska pentrado. A. Kmieliauskas estas aŭtoro de multaj portretoj, preĝejaj bildoj (ekz. tiuj en la Vilna preĝejo de St. Kazimiro), pejzaĝoj, freskoj, dekoraj kaj portretaj skulptaĵoj, de pli ol 30 surtombaj monumentoj, de pli ol 320 ekslibrisoj. La pli granda parto de lia kreado, precipe la religia arto, dum soveta regotempo estis ignorata.

La intervjuo kun la elstara artokkreisto **Antanas Kmieliauskas** okazis en lia Vilna hejmo.

Litova Stelo: Estimata kreanto, kiam kaj kiel komenciĝis Via artokreista vojo? Verŝajne jam en lernejo?

A. Kmieliauskas: Nek en elementa lernejo, nek en gimnazio mi pensis, ke la arto iĝos mia sorto. Mi jam estis fininta la dekan klason de gimnazio. Tiam mia frato Jeronimas, kiu ĵus finis Kaŭnan Artan lernejon, diris ke lerni en tiu lernejo estas multe pli interese, ol en ordinara provinca gimnazio – ankaŭ vi iru tien; poste vi, se vi ne deziras, povos ne esti artokkreisto. Iris mi al Kaŭno. Komence mi vizitis muzeojn. Trafis mi al muzeo de M.K. Čiurlionis. Iras mi tra salonoj kvazaŭ tra preĝejo. La bildoj de Čiurlionis tiom impresis min! Eniras mi ekspoziciejon de soveta arto. Tie oni prezentas masonantajn virinojn en laboristaj kombineoj. Ne, mi pensas, se mi decidiĝos esti artokkreisto tiam nur tia kiel Čiurlionis, sed ne kiel tiuj sovetaĵoj. En la arta lernejo mi plenumis kontrolan pentradon kaj oni akceptis min. Lernis mi diligente.

Por kursfino mi pentris grandan bildon: *Ripozanta plugisto*. Oni taksis ĝin eminente, sed ne permesis ĝin prezenti en ekspozicio de kursfinaj laboroj – ja mia plugisto lace-triste rigardis al la tero kaj al oni ekŝajnis, ke li tre ne deziras fariĝi kolĥozano. Fininte la lernejon mi studentiĝis en Vilna Arta instituto.

LS: Dominan parton de Via kreado faras religiaj temoj. Temas kaj pri bildoj kaj pri skulptaĵoj. Ĉu ekzistas iu klarigo pri tio? Kiel vi trovis tiujn temojn?

A. Kmieliauskas: Dum mia infaneco en la vilaĝo forestis kino, arta fotografio, televido, sed postrestis antaŭmilitaj religiaj revuoj “*Žvaigždė*” (stelo), “*Lurdas*” (Lurdo) iam abonitaj de mia avino. Ni, infanoj foliumadis ilin, ĝuis ties bildojn. Imponis al ni ankaŭ bildoj en proksima preĝejo. Ĉi tio, memkompreneble, jam de infaneco alkutimigis nin al la religia temaro. Krome, okazis ankoraŭ jena stranga okazintaĵo. Dum la germana okupado en la lernejo oni instruis religion. Antaŭ Kristnasko la pastro taskis al ni – pentru Kristnaskan staltrogon. Mi trafolumis la avinan “*Lurdas*” kaj transpentris ties staltrogon. La desegnaĵon mi montris al miaj samklasanoj. Ili petis min, ke mi pentru ankaŭ por ili. En la klaso estis 40 gelernantoj – mi pentris al ĉiuj. Ĉiuj desegnaĵoj, tutnature, estis tre similaj. La pastro interesiĝis, kiel tiel okazis. Ni ne mensogis kaj ĉiuj ricevis de li eminentan noton. Pasis eble kvar jaroj. Estis jam soveta regotempo. La pastro sciis, ke mi eklernis en Kaŭna Arta lernejo. Li kredis je



miaj kapabloj kaj petis min, ke mi kreu por la preĝejo de urbeto Butrimonis skulptaĵon de St. Jozefo – vi scipovos tion! Kion fari? Unu kamparano venigis al ni tiliajn trunkojn. Mia patro kungluis ilin kaj forĝis por mi ĉizilon. Mi ĉizis, ĉizis la lignon kaj skulptis la figurojn – St. Jozefo kun Kristo. Mia avo la skulptaĵon sekrete veturigis kaj starigis en la preĝejo. Estis mia la unua skulptaĵo. Poste la pastro denove venis – en Butrimonys mankas anĝeloj, faru anĝelon! Do, kune kun mia lerneĵano mi muldis anĝelon. Tiel mi komencis ...

LS: La Artan instituton Vi finis kiel bildostabla pentristo. Tamen en multaj aliaj landoj Vi estas konata kiel ekslibristo. Vi partoprenis en internaciaj ekslibrisaj ekspozicioj en Germanio, Pollando, Italio. Kiel komenciĝis Via okupiĝo pri kreado de ekslibrisoj?

A. Kmieliauskas: Post la fino de la studado mi kreis pli ol 3 metrojn altan granitan skulptaĵon de St. Kristoforo, kiu estis starigita en la korto de St. Kristofora preĝejo en Vilno. Post tiu faro oni forigis min el Artokreista asocio, kio sekve malebligis min partopreni en ekspozicioj okazantaj en Sovetunio. Pri mi oni eĉ ne rajtis skribi en soveta gazetaro. Tiam mi komencis krei ekslibrisojn. Ili estis sendataj al Pollando, al alilandaj eksterlandaj ekspozicioj kaj tie akiris altan agnoskon. En Italio al mi estis atribuita Ora medalo. Post nelonge oni estis devigitaj ĉesigi mian ignoradon kaj permesis restarigon de mia membreco en la Artokreista asocio.

LS: Multaj, sed ne Vi, preferas specialiĝi en unu artobranĉo – nur skulptado, nur grafiko, nur bildostabla pentrado ktp. Diference de multaj Viaj gekolegoj Vi estas tre diversflanka kreanto, ekzemple, Vi estas freskisto...

A.Kmieliauskas: Multaj min pri tio demandas. Eble estus pli bone perfektigi en unu artobranĉo. Tamen mi devenas el vilaĝo, mi sentas min vilaĝano ankaŭ nun. Vilaĝanoj estis diverskapablaj. Postmilite multo mankis en magazenoj. Mia patro estis kamparano bredisto, samtempe forĝisto, lignaĵisto, agronomo kaj kontisto. De la infaneco venis mia kompreno – necesas kapabli fari ĉion. Same estis kun mi ankaŭ en la arto. En la Arta instituto mi ekstudis pentroarton. Por akiri bonan



desegnopovon mi studis laborojn tiujn de Mikelanĝelo, Rafaelo, Rembranto. Tio ebligis min pli facile veni al grafiko, skulptado kaj freska pentrado. En la supera arta lernejo oni instruis speciale nek skulptadon, nek freskan pentradon. Studante mi loĝis kune kun litova reemigrinto el Rusio, kiu min instruetis freskan teknikon. Do, post mia rekono kiel ekslibrisisto venis al mi pentristo Petras Repšys kaj diris – vi laboras por Italio, por aliaj landoj, laboru por Litovio, kreu freskojn por Vilna universitato! Mi ekdubis – oni ne permesos tion al mi. Repšys promesis ĉion solvi. En Italio mi ne estis, sed mi jam sciis kiel oni povas tion bonkvalite plenumi. Necesas havi bruligitan kalkon, bruligitan per lignokarbo, sed ne per minkarbo kiel kutimas, ĉar enhavata sulfuro senkolorigas kolorojn.

Al mi pri tio ĉi helpis unu maljunulo el provinco. Necesas havi specialajn deficitajn farbojn, kiuj tiam forestis en Litovio. Subtenis min unu rusa arkitekto al kiu mi iam sendis miajn ekslibrisojn. Li traserĉis Sovetunion kaj sendis al mi kelkajn kestojn kun la farbo. Mi faris freskojn por la universitata senatejo kaj librovendejo. Tiel mi realiĝis kiel freskisto.

LS: Mi scivolas pri la fenomeno kiam en verko de artokreanto oni sentas nacian koloron. Ekzemple, oni ja povas distingi aŭtoron de japaneska pentraĵo disde italeska. Ĉu sentblas io “litova” en laboraĵoj de litovaj aŭtoroj?

A. Kmieliauskas: En la XIX jarcento la Katedro de Desegnado kaj pentrado de Vilna universitato estis la ĉefa artokrea centro en Respubliko de Ambaŭ Popoloj (konfederacia Pola-Litova ŝtato). Post malgajno de la ribelo de la jaro 1863 kontraŭ rusimperia okupado Litovio por longe perdis sian artolernejon. Litovaj talentuloj estis devigitaj lerni arton en aliaj urboj de la imperio aŭ alilande. Jam antaŭ kiam Litovio en 1918 reakiris sian ŝtatecon, ekstaris demando, kia devus esti litova profesia arto. La pentristoj M.K. Čiurlionis, K. Šimonis kaj studintoj en Parizo mem – pentristo A. Žmuidzinavičius, skulptisto P. Rimša proponis turni la atenton al la litova popola arto. Ni ja scias kiom interesaj kaj originalaj estas litovaj teksaĵoj, trikaĵoj, forĝitaj krucoj, amatore tajlitaj skulptaĵoj *Zorgulo* (enpensiginta Kristo). Kompare kun la profesia, la litova popola arto estas pli primitiva, tamen ofte pli sencohava. Tial jen kelkaj miaj skulptaĵoj estas plenumitaj ne en klasika, sed en popola spirito. Ekzemple, la Pjetao por komunistaj turmentitoj, starigita en urbo *Telšiai*.



A. Kmieliauskas kun alia elstara litova artokreisto R. Dichavičius

La litova popola arto donis al mi ideojn por miaj ekslibrisoj, kiuj poste akiris eksterlandan agnoskon. Mi opinias, ke nia nuntempa kreema junularo povus pli atenti la popolan pensadon kaj tiun profesie realigi. Tio stimulus la litovan stilon kaj ni estus pli interesaj por la mondo. Ho ve, nuntempa junularo strebas iĝi tutmonde gravaj artokreantoj kaj kopias (iam ne malbone) la usonan arton. Kompreneble, lerni per bonaj eksemplaroj de la mondo indas, sed necesas konservi ankaŭ sian, propran stilon.

LS: Antaŭ dudek jaroj en nia urbo oni tre malofte povis ekvidi skribopentritan domomuron. Nun tuta Vilno, kiu antaŭ nelonge estis anoncita kultura ĉefurbo de Eŭropo, estas pripentrita per skribodesegnaĵoj – sgrafitaĉoj.

A. Kmieliauskas: Iam dum sovete tempo el Usono al Litovio venis iu litovo kaj venigis tie eldonitan libreton *Sgraffitto – strata arto*. Ni estis mirigitaj – sur urbodomoj estis pripentrita ĉio ajn. Nun la fenomeno disvastiĝis tra tuta mondo. Por junularo tio estas oportuna sinesprima manifestiĝo. Akiru farbocilindron kaj ek al pentroskribado! Estas malbone, ke oni pripentras ĉie ajn – ankaŭ barbare en mallicaj lokoj. Trairante la urbon oni povas ekvidi plej diversajn stratpentaĵojn – inter ili ankaŭ sufiĉe interesajn kaj trafajn. Eblus tiujn kolekti por iu eldonota libro, sed restas danĝero ke tio povus stimuli pluan murpentradon. La pentremo estas tute natura infana fenomeno. Ankaŭ junularo deziras ion videblan postrestigi. Tio venas de pratempo, kiam oni diversintence pentris sur rokaj muroj. Tamen la stratpentrantoj plej ofte posedas neniun ideon, eble nur celon demonstri sian faron al siaj samaĝuloj.



LS: Porfine la tradicia demando de nia revuo – ĉu Vi iam renkontiĝis kun Esperanto aŭ viva esperantisto. Kion Vi opinias pri la fenomeno de Esperanto?

A. Kmieliauskas: Kompreneble, pri Esperanto mi aŭdis. Iam mi renkontiĝis kun Kazimieras Skebėra, klerulo, batalanto por sendependeco de Litovio, soveta ekzilito. Li estis talenta rakontisto kaj scipovis Esperanton. Li rakontis, ke dum la tempo de sendependa Litovio li per Esperanto korespondis kun multaj landoj. Li fieris pri tio. La ideo pri la rimedo por tutmonda interkompreniĝo kiu apartenu al neniu aparta ŝtato ekŝajnis al mi vere interesa. Al ni, litovoj, iam ne plaĉis la devigo kun ĉiuj paroli ruse, nun la angla estas altrudata. Kaj Esperanto – ĝi estus vere internacia lingvo.




Mia longa vojo al Esperanto tra lingvoj franca, angla kaj germana

Kiam mi lernis en mezlernejo, mi revis iĝi instruistino de la franca lingvo. Tamen fininte la mezlernejon en la jaro 1962, mi ŝanĝis la elekton pro tio ke mi ne estis certa, ke mi sukcesos eniri en la Pedagogian instituton, ĉar mi sentis min ne sufiĉe preta por eniraj ekzamenoj. En tiu kazo, se mi ne enirus, mi devus reveni hejmen kaj iri labori en kolhozo, kie salajroj estis tre tre mizeraj. Por abiturienta balo mi ne havis eĉ ŝuojn, mia fratino por tiu vespero pruntedonis al mi siajn sandalojn. Tiel mi ŝanĝis mian decidon kaj eniris en Teknikan mezlernejon de Nutraĵa industrio.

Mi studis teknologion de Lakta industrio. Vi ne povas imagi kia mi estis feliĉa, kiam mi junio de 1965 defendis mian diplomon laboron! Mi sentis min preskaŭ fluganta per flugiloj. Ĉar tio signifis, ke mi jam estos memstara kaj ne ŝarĝos miajn gepatrojn.

Mi - „novbakita“ diplomita fakulino teknologistino de Lakta industrio - ricevis enoficigon en la nekonatan, ne finkonstruitan Rokiŝkis'an Fromaĝan uzinon (en la centro de samnoma distrikto). Tial mi komencis labori en lokaj punktoj de laktokolektado (laktoakceptado) kaj en certa fako de Butera produktado (urbeto Kazliŝkis). Post sep monatoj la Fromaĝa uzino estis finkonstruita kaj mi komencis labori en la nova uzino, en la fako de laktoakcepto. Tiutempe la kondiĉoj de laboro, estis tre malfacilaj, precipe vintre, ĉar mi devis gustumi, taksu kvaliton de ĉiu liverparto de lakto ekstere sur kargopodio. Krome, la pumpiloj kiuj pumpis la lakton en pesilojn faris tian grandan bruon, ke ni kapablis interparoli nur kriegante. Post tio mi ĝis nun ne povas elteni grandan bruon kaj laŭtan muzikon.

Tiutempe mi devis labori ĝis kiam oni alveturigis (liveris) lakton, poste ĉion kalkuli kaj transdoni al mia estro. Ĉe la fino de dektago aŭ monato, mi devis ĉion sumigi, konformigi miajn nombrojn kun tiuj de laktoliverantoj kaj rezultajn donitaĵojn transdoni al librotenistino. Por sumado kaj subtraho mi uzis abakon - lignan kalkulilon, kaj por multipliko – pezant fe-



Post kvar jaroj da laboro en Lakta industrio mi jam ne sentis min "krudulino"

ran mekanikan kalkulilon kun turnilo (kranko), kiun oni nomis „Felikseto“.Do, trifoje monate la laboron mi finadis je la 11-12 horo ptm. Kaj mian laboron mi ja komen-cadis je la 6-a horo atm., ĉar mi devis ekspedi laktoveturigilojn kun senkremigita lakto.



Post ses jaroj da laboro mi havis eblecon labori en mikrobiologia fako de laboratorio. Poste tiun sperton mi aplikis en aliaj laboratorioj de Nutraĵa industrio

Post unu kaj duono da jaro de tiu malfacila kaj neinteresa laborado aperis unu vakanta laborloko en la uzina laboratorio kaj mi transiris tien. Kaj post tiam preskaŭ tutan tempon (krom kelkaj jaroj) ĝis la emeritiĝo mi laboris en laboratorioj de Nutraĵa industrio.

Post unu jaro da laboro en lakta industrio mi denove ekrevis pri ekstudo de la franca lingvo – per koresponda instruado en *Vilnius* (la ĉefurbo de Litovio). Feriante mi renkontis mian instruistino de la franca lingvo kaj rakontis al ŝi pri sia revo, tiam ŝi informis min, ke korespondaj studoj de la franca lingvo okazas nur en Riga (la ĉefurbo de Latvio). Tiam mi mian revon pri franca

lingvo mortigis kaj daŭrigis laboron en Fromaĝa uzino. Unu tagon siajn gestudentojn, kiuj praktikadis en la uzino, vizitis instruisto el Teknika mezlernejo. Rigardante al mi li diris al miaj gekolegoj: „Mi neniel povas imagi, ke tiu fraŭlino (tiam mi estis 22 aŭ 23-jaraĝa) povas esti laktistino. Mi imagas, ke ŝi povas esti nur instruistino de franca lingvo.“ Mi ne komprenis, pro kio li tiel decidis, ĉu pro mia alta, svelta staturo aŭ mia sinteno.

Aŭtune de la jaro 1971 mi eksciis, ke en la urbo estos organizata kurso de la angla kaj germana lingvoj. Mi hezitis, kiun lingvon elekti por lerni, sed laŭ mia intuicio mi elektis la anglan lingvon kaj ne eraris. (Post multaj jaroj ĝi estis por mi tre bezonata, ĉar mi devis kontakti en laboro kun angle parolantaj posedantoj-kontrolantoj.) La kurso okazis unufoje semajne, kaj mi la unusola komencis de la litero „a“, ceteraj gelernantoj jam estis iom lernintaj la anglan lingvon. En la fino de la kurso la instruistino venis al mi kaj demandis: „Valdone, ĉu vi verdire neniam lernis la anglan kaj komencis de la litero „a“?“ Mi jesis, kaj instruistino diris: „Se tiel, vi certe havas kapablon por fremdaj lingvoj.“

Poste, en 1973 mi ekloĝis en la distrikta centro *Panevežys* (Paneveĵis), sed la anglan mi ne forlasis, mi riĉigis mian anglan vortaron legante lernolibrojn kaj fabelojn. En la jaro 1988 mi komencis viziti kurson de la germana lingvo. La kaŭzo estis tia, ke mia tiama estrino donis al mi taskon trovi instruiston, kiu traduku ofican leteron ricevitan el Germanio. Mi do pripensis, ĉu mi mem ne povus ellerni la germanan, se mi ellernis tre komplikan anglan preskaŭ ĝis la nivelo de 11-a klaso de mezlerneja kurso? Tiel la germanan lingvon mi ellernis ĝis la nivelo necesa por interparoli en vendejo, surstrate aŭ dum vojaĝo. Tiam mia filo diris, ke li bezonos helpon pri la angla lingvo, se li eniros en filion de Politeknika instituto (li finis teknikan lernejon, kie neniu zorgis pri fremdaj lingvoj). Tial mi ekvizitis la kurson de angla lingvo de pli alta nivelo. Kaj instruistino de la kurso faris al mi du komplimentojn: „Valdone, via vortaro de angla lingvo estas riĉa, sed via prononcado de la angla estas terura.“ Ho ve! De kie povis esti mia prononcado bona, se mi lernis la anglan lingvon memstare nur per libroj? Ankoraŭ mi memoras unu kazon pri la germana lingvo, kiun mi forlasis kaj forgesis, krom kelkaj vortoj. Inter angle parolantaj estontaj posedantoj de Biera fabrikejo estis germanoj. Unutage unu el ili demandis min: „Šprehen zi doiĉ“? Mi tuj tute flue respondis: „Najn.“ Post mia „Najn“ mi ekaŭdis gajan ridegon en tiu

kompanio. Kaj pri la germana lingvo ĉio estis finita - en mia vivo mi nur tiom aplikis la germanan.

En komenco de oktobro de 1998 mi surstrate renkontis mian samideaninon Zofija el la klubo de sanemuloj kaj demandis, kien ŝi hastas. Ŝi diris, ke ŝi iras al la kurso de la lingvo Esperanto kaj klarigis en kiu loko okazas la kurso kaj je kiu horo. Mi ekinteresiĝis kaj decidis morgaŭan tagon iri kaj esplori, ĉu tiu lingvo estas malfacila.



Post E-kurso. Grupeto da ĝelernantoj kun nia instruisto est. A.Zahariaš. Panevejis, 27.11.1998

De maldekstre: R.Vaičius, N.Rijkoviene, A.Zahariaš, V.Skujiene kaj A.Lepeškiene

Se la lingvo ŝajnos al mi malfacila, tiam mi ne rompos mian maljunan, plenŝtopitan de laboraj zorgoj kapon (mi estis jam preskaŭ 54-jaraĝa!). Mi venis post la laboro al la vespera grupo kun intenco nur iom aŭskulti. Kaj por mia granda ekmiro mi ekaŭdis preskaŭ francan lingvon, nur finaĵoj estis aliaj! Dum la leciona interrompo unu lernantino donis al mi libreton vertkitan de Telesforas Lukoŝevičius (nun Honora Membro de UEA) „Ni parolu esperante“ (Konversacioj por

turistoj). Mi tuj foliumis ĝin, kaj ekvidis, ke gramatiko kaj prononcado de lingvo Esperanto estas sufiĉe simplaj kompare kun la angla. Tial mi ekde sekva lundo komencis viziti la kurson, kiun gvidis slovaka instruisto Anton Zahariaš. La kurson mi vizitis kvarfoje semajne, kvankam la lecionoj okazadis kvinfoje semajne. Post kvar semajnoj, la 7-an de novembro 1998, mi kun grupeto da geesperantistoj panevejisanoj iris al urbo *Siaŭliai* por festi 40-jaran jubileon de renaskiĝo de E-movado de la urbo. Mi aŭskultis prelegantojn, gratulantojn kaj preskaŭ ĉion komprenis, nur por ekparoli per Esperanto tamen mankis sperto, vortoj kaj gramatikaj scioj.

En novembro de 1998 la slovaka instruisto okazigis daŭrigan E-kurson, al kiu ankaŭ mi aliĝis. Mi tre estimas mian la unuan E-instruiston Anton Zahariaš, bedaŭrinde forpasintan la 13-an de septembro 2000. Mi admiris kiel senpere, sindone perbilde aŭ per manmovoj ktp. li klarigis al ni nekonatajn vortojn. Ankaŭ kun granda amo, respekto li legis tekstojn el la vivo, verkoj de L. Zamenhof, la kreinto de la Internacia lingvo Esperanto.

Fininte la kurson de Esperanto mi tralegis E-libreton pri Sankta Kazimiro, kiun al mi donacis mia la unua E-instruisto. Mi trovis multege da nekonataj vortoj, kiujn mi enskribis en mian vortareton. Pli poste mi legis plu kaj tiele pliriĉigis mian E-vortaron.

Somere de 2000 Ĝinette Martin, instruistino el Francio, vizitis siajn samideanojn Eŭgenija kaj Algis Kaspiravičius. Mi donis al ŝi mian adreson kaj petis, ke iu ŝia klubanino skribu al mi. Tiel mi komencis perfektigi mian Esperanton per korespondado. Post emeritiĝo en la jaro 2003 mi ekhavis pli multe da tempo kaj decidis perfektigi mian Esperanton, legante la Biblion - iam en unu libreto mi tralegis, ke unu homo ellernis sep fremdajn ling-

vojn legante nur Bibliojn – en sia gepatra kaj en fremda lingvo. Mi prunteprenis de instruistino P.Lukoševičiene Biblion en Esperanto, sed mi volis havi mian propran. De nia instruisto d-ro V.Šidlauskas mi eksciis adreson en Anglio, de kie mi povus akiri la Biblion. Internacia Biblia Misio sendis al mi la Biblion en Esperanto, ankoraŭ estis senditaj studfolioj kun demandoj (el Biblio), al kiuj mi devis respondi. Tiel mi studis Biblion per korespondo kaj perfektigis Esperanton preskaŭ tri jarojn.

Poste mi komencis provi traduki mallongajn artikolojn, fabelojn. Mi ankaŭ legis kaj legas la revuojn „Litova stelo“, „Dio benu“, „Dia Regno“ kaj „Espero Katolika“, kaj iom helpas pri eldono de kluba monata informilo „REVulo“. En la E-aranĝoj mi partoprenis malmulte – mia la unua E-kongreseto (simileta al UK) estis BET-37 en la jaro 2001 en Kaŭnas. Tie partoprenis geesperantistoj el 20 landoj, min impresis ĝoja, amikeca, frateca etoso kiu regis en tiu aranĝo. Ankaŭ tre interese gvidis E-kurson instruistino el Pollando Nina Pietuchowska. Poste mi partoprenis en IKUE-57 en Kretinga (2004), en UK-90 Vilnius (2005), tie mi konatiĝis kun novaj korespondamikoj. Poste sekvis BET-43 en 2007 en urbo Ŝiaŭliai.

En 2008 efektiviĝis mia revo estiĝi instruistino – nur ne de la franca lingvo, sed de Esperanto. Mi kun mia kolegino E. Kaspiravičiene komencis gvidi Elementan E-kurson al grupeto de sanemuloj. La kurson finis kaj ekzamenon trapasis kvar virinoj (la kvina fuĝis antaŭ la ekzameno).

Mi tre ĝojas, ke ĉiuj tiuj novaj esperantistinoj aliĝis al la grupo de Panevejis'aj geesperantistoj, kaj du el ili en somero de 2009 jam partoprenis en Ekumena kongreso (EEK-19) en Vroclavo (Pollando).

Al ĉiuj Esperanto komencantoj mi konsilas, ke ili post la elementa aŭ alia E-kurso ne metu flanken lernolibrojn, vortarojn, sed komencu legi libretojn kaj nepre komencu korespondi kun gesamideanoj.

Tio tre helpas por perfektigo en Esperanto. Nun ja estas ebleco korespondi ne nur paper-poŝte, sed ankaŭ elektron-poŝte. Aperis ankaŭ ebleco riĉigi sian konon de Esperanto per interreto laŭ la adreso: www.lernu.net

Mi sincere bondeziras al ĉiuj, kiuj ŝatas vojaĝi, komunikiĝi kun gesamideanoj, ellerni la facilan, flekseblan, belsonan Internacian lingvon Esperanto.



Post trapaso de E- ekzameno kun miaj lernantinoj. 2008.04.29

De maldekstre - staras: A. Mieliauskaite-Gvergjdienne, D. Manioniene, A. Burkauskiene kaj A. Plerpiene; sidas: membroj de la ekzamena komisiono: A. Lepeškiene, Honora Membro de UEA Tel.Lukoševičius, V. Skujiene kaj prezidanto d-ro V. Šidlauskas.

Valdone SKUJENĖ

VOJAĜU PER ESPERANTO: HISPANIO

Dum kelkaj jaroj mi maturigis la esperon – veni al Hispanio kaj iom vojaĝi laŭ la pilgrima vojo de St. Jakobo. Iufoje ĉe interŝanĝo pri personaj planoj unu esperantistino rekomendis al mi nepre kunigi la vojaĝon kun la E-aranĝo, kiu ĉiujare okazas ĉe la Mediteranea maro, proksime de Barselono. La aranĝo havas la titolon “Internacia Esperanto-semajno de la kulturo kaj turismo” kaj okazas ĉiam en alia kurorto. Mi konsideris la konsilon kaj estas pri tio tre kontenta, ĉar tio estis unu el la plej imponaj miaj vojaĝoj. Mi skribis al la organizanto Luis Serano Perez, kiu helpis kontakti kun aliaj hispanaj esperantistoj, kiuj protektis nin dum la vojaĝo. Do, la vojaĝon eblas dividi je tri partoj: semajna partopreno en la aranĝo kun la malfru-aŭtuna ĝuo pri varma maro kaj arda suno, kvintaga vizitado de Barselono kaj Saragoso kaj la tria parto – 11-taga piedvojaĝo de Astorgo ĝis Santjago de Compostela, entute 260 km.

La 17 a internacia esperanto semajno de la kulturo kaj turismo en Pineda de Mar, 2009. 3-10 de oktobro

Ni loĝis en bonega hotelo, kun eksteraj basenoj kaj saŭno. Ni estis reĝe nutrataj – tre variaj naciaj kaj aliaj nutraĵoj kaj kompreneble la hispana vino. Ĝis la maro estis 200 m. Ĉirkaŭ 120 partoprenantoj, la plimulto venadas ĉi tien ĉiujare kaj tial konas unu la alian. Plej multe da venintoj estis el Hispanio mem kaj el Francio (evidentiĝis, ke la sudaj francoj komprenas la katalunan lingvon). Estis partoprenantoj el Belgio, Aŭstrio, Latvio, Svedio, Germanio kaj eĉ el Kubo, nu kaj nia triopo el Litovio. La aranĝo distingiĝas per hejmeca kaj varma atmosfero, forestas kutima en aliaj aranĝoj oficialeco kaj pompo. Dum la semajno oni okazigas kelkajn ekskursojn, okazas diversaj prelegoj, diskutado.



*Dum la vojaĝo
al la kurorto
Tosa de Mar*

Dum la vesperoj la partoprenantoj konversacias en la hotela drinketejo, en-korte ĉe baseno aŭ en kunvena salono. La tradicio de ĉi tiu aranĝo estas “cremat”-vespero, kiam oni ardigas en metalaj ujoj romon kun spicaĵoj kaj poste ekbruligas ĝin. Oni disverŝas ĝin en speciale por ĉi tiu aranĝo fabrikitajn argilajn kruĉetojn, kiuj restas por memoro de la partoprenantoj. Alia grava tradicio de ĉi tiu aranĝo estas prezentado de premio de Ada Sikorska Fighiera. En 2009 ĉi tiu premio estis prezentita al Katalin Kovats – hungarino, nun vivanta en Nederlando, filologo, diplomita lingvo-instruisto pri Esperanto, gvidanto de la ekzamena komisiono de UEA, ellaborinto kaj respondenculo pri la novtipaj referencadraj ekzamenoj, redaktoro de la porinstruista retejo www.edukado.net.



La organizanto de la aranĝo Luis Serrano enmanigas la premion de Ada Sikorska al Katalina Kovats

Katalina Kovats tre interese prelegis pri la vivo kaj laboro de pentristo Vincent Van Gogh. Wolfgang Gunter instruis poŝtarton (ni mem faris intersajn poŝtkartojn kun stampitajn bildoj, signoj, vortoj), Antonio Marco Botela prelegis pri poezio de Lorca, doktorino Rafaela Uruena – pri la tutmonda klimatsanĝo.



Kun Antonio Marco kaj lia edzino Pilar

La semajno tuje pasis kaj sabate matene ni adiaŭe satbrakumis kaj interkisis nin kiel la plej bonaj geamikoj.

La gastado en Barselono kaj Saragoso

En Barselono min kun mia kunulino Dalia akceptis Jesus Perez Caballero. Li estas sociala laboranto, tial li tre fervore kaj sincere zorgis pri ni. Jam en metroa stacio li renkontis nin svingante per verda kepo, venigis ĉareton, por ke al ni ne estu malfacile porti la pakaĵojn. Interparolante ni atingis lian hejmon, kiu estas proksime de Zamenhof-strato. Tio nin pli poste savis.



Zamenhof-strato en Barselono

Iom ripozinte post la vojaĝo kaj regalitaj per hispana *gaspacio*, ni antaŭmetis niajn intencojn – la unuan tagon dediĉi por vizitado de konstruaĵoj de *Gaudi* kaj de *Gveli*-parko, kaj la duan – por veturado al monaĥejo *Montserat*. Do ni forvojaĝis kaj baldaŭ ricevis bonan lecionon, kiel en fremda urbo necesas sin armi per informacio. Ja la telefonojn ni restigis hejme, enpoŝigis kelkajn eŭrojn kaj poŝtrapidis la hastan akompanion. Li nin gvidis de unu konstruaĵo de *Gaudi* al aliaj, post kiam ni venis al *Gveli*-parko.

La impresoj estis surprizaj, ni ĉirkaŭrigardas kvazaŭ trafintaj fabelan landon, sed subita telefonsonoro al nia akompananto interrompas la ekskurson. Iom parolinte *Jesus* diras, ke li urĝe devas rapidi hejmen, ĉar okazis malbonaĵo kaj li forkuras. Ni havas nek telefonon nek lian adreson, nur iom memoras kiel ni kun li iris. Komence ni iom embarasiĝas, sed interkonsiliĝinte, ke ni scias laŭ kiu metroa linio kaj ĝis kiu stacio necesas veturi, ni decidas, ke ni iel trovos la vojon. Tiel ni plue raviĝas pri la arto de *Gaudi*, poste per buse revenas la urbon kaj per metroo atinginte necesan halto-

stacion, ni unue serĉas Zamenhof-straton. Post kiam ni atingas ĝin, ĉio iĝas pli klara kaj ni sukcese revenas al Jesus. Evidentiĝis, ke li estis restiginta bolantajn fazeolojn, kiuj bruldifektiĝis kaj rostiĝis, la veninta najbarino elŝaltis la kuirfornon kaj telefonis al li. La brulodoro restis por longe kaj por ni tio estis bona leciono por estonto.

Jesus tre helpis al ni ŝpari la tempon por ekvidi multon dum du tagoj. Li akompanis nin ĝis la loko por foriri al *Montserrat*, ĉion klarigis, pertelefone aĉetis biletojn por ni – necesis diri nur numeron de kredita karto kaj al ni estis indikita horo de alveno – la biletoj estos ĉe la stiristo. Imagu, kiom da tempo tio ŝparas en tia granda urbo kia Barcelono, kie estas ne unusola busa stacio se oni devus iri tien por aĉeti biletojn. Necesas substreki, ke perbusa vojaĝo en Hispanio estas vere nemultekosta – preskaŭ 400-kilometran distancon ni veturis kontraŭ 48 Lidoj. La rapidaj trajnoj estas multekostaj.



*Jesus Perez
forakompananta
nin el Barcelono*

En Saragoso ni trafis grandegan tuthispanian jarfeston – tiun de *Marija de Pilar*. Niaj protektantoj tre bedaŭris, ke ni devos travivi tioman homamasan kunpuŝiĝon, sed ni treege ĝojis povinte tion ekvidi.

Rakonti tion ne estas simple, ĉar dum la festo Barcelonon kunveturas ĉirkaŭ 2 milionoj da homoj. La 12-a de oktobro estas festa tago en tuta Hispanio, kaj en Katalonio estas du festotagoj. La tuta urbo estas kiel senfina karnavalo, amasoj da naciaj kaj antikvaj vestoj vestitaj homoj sur la stratoj dancas, kantas, ludas. La duan tagon okazas procesio de Kristala Rozalio – oni portas diversajn ekleziajn relikvojn, la manifestacio laŭ la stratoj daŭras 3-4 horojn. Pri nia protektado en Saragoso zorgis Antonio Marco Botela, tre eminenta honoraĝa esperantisto – li renkontis nin, poste aliaj esperantistoj gvidis nin tra la urbo, por dumprocesia akompano venis ankaŭ aliaj.



*Akompanataj de
Saragosaj esperantistoj*

Antonio Marco tre bedaŭris, ke li ne povas nin akcepti en sia hejmo, ĉar la nomo de la erzino estas ja Pilar kaj ĉi tiun tagon kunveturas ĉiuj liaj infanoj kun siaj familioj. Oni loĝigis nin en esperantista klubo. Estas privata loĝejo, kiun per propra mono aĉetis kelkaj esperantistoj.



*Kun Eduardo
en Saragosa
esperantintista klubejo*

Iun tagon ni el Saragoso vojaĝis al eta urbeto Agredo, post 80 km, por viziti monaĥejon, kie ripozas korporelikvoj de monaĥino Maria Agredanino. Pri ĉi tiu monaĥino estas eldonita romano de Javier Siera "La blua sinjorino". Maria Agredanino posedis bilokaligan talenton kaj neforveninte el sia monaĥejo ĉirkaŭ 500-foje faris

vizitojn al Meksikio kaj tie disanoncis la kredon. Oni supozas, ke ĝuste ŝi estis la Madono de Gvadelupo. Ĉiuj ŝiaj “vojaĝoj” estas priskribitaj, pri tio sciis ankaŭ papo kaj reĝo (ŝi vivis en la XVI jarcento). Pri ŝi kelkfoje interesiĝis ankaŭ Inkvizicio, sed ĉar ŝi instruis kredon, ĝi ne povis kulpigi ŝin pri sorĉfaroj. Ŝi ne estis sanktigita, ĉar ŝia libro, kiu estis diktita al ŝi, “La mistika Dia urbo”, iel ne plaĉis al Vatikano (cetere, ĉi-jare mi eksciis, ke la libro estas tradukita al la litova lingvo kaj mi akiris ĝin). Kiel skribis J. Siera, la mistikaj koincidoj venigis lin al Agredo, same ankaŭ mi neatendite eksciis pri ĉi tiu monaĥino. Foje, jam dum la planado de la vojaĝo, amiko veninta al mi vespere enŝaltis radion (mi mem preskaŭ neniam aŭskultas radioelsendojn) kaj post ioma aŭskulto de muziko la tradukistino rakontis pri Maria Agredanino, pri tio kiel ŝi mem faris viziton al ĉi tiu monaĥejo. Min tio tre interesis, mi rigardis la mapon – ne tro malproksimas de tie, kie ni estos. Kaj tiel, adiaŭinte en la homamaso kun Saragosaj esperantistoj, ni revenas al esperantista klubejo, prenas la objektojn, la ŝlosilojn enmetas en la poŝtkeston (laŭ la interkonsento) kaj ek al busa stacio! Dum la nokto ni devas atingi Astorgon.

Laŭ la pilgrima vojo al Santjago de Compostela

Venas ni antaŭ tagiĝo kaj eksidas en stacia kafejeto ĝis kiam el mallumo antaŭ ni aperas konturoj de episkopa palaco, projektita de Gaudi. Ni trovas pilgriman azilon kaj ricevas pilgrimajn pasportojn, tien en ĉiu noktejo oni metas markojn kaj en la urbo Santjago la pasporto estas prezentata al pilgrima centro. Se vi trapasis ne malpli 100 km, aŭ traveturis bicikle 200 km – oni enmanigas latine plenigitan ateston. Unu post alia aŭ grupete treniĝas pilgrimantoj, kun bastonoj kaj “bejoj”, fiksinte sur la tornistroj konkon – pilgrimulan signon. Demandi pri la vojo ne necesas. Ĉie estas flavaj montriloj: sur pavimo, domomuroj, bariloj, la konkaj signoj estas enpremitaj trotuare. Ĉe ĉiu renkontiĝo ĉiuj salutas unu la alian: “buen camino” (camino – vojo).



Camino de Santjago

Oni renkontas tiujn vojaĝantojn, tre junajn kaj sufiĉe aĝajn, venintajn el la plej malproksimaj landoj – Aŭstralio, Kanado. En la unua noktejo veninta junulino nin salutas litove – ŝi mem venis el Latvio.

La unuan tagon ni superas dudek kilometrojn, dumvoje sidripozinte en plaĉlogaj je mezepoko odoretaj urbetaj kafejetoj, trinketinte kafon aŭ vinon, interparolinte kun renkontitaj pilgrimantoj. Kvankam en Litovio, kun Kaŭna piedturisma klubo “Žygeivis” ni almenaŭ foje dummonate vojaĝas po 25 km, sed estas tio io alia, kiam vespere vi revenas sian liton kaj matene vi ne devas ien forvojaĝi. Ĉi tie, la morgaŭan tagon, la gamboj estas iom pezoplenaj kaj ontas la pluvojaĝo la plej malfacila kaj la plej longa elde la tuta itinero – 29 kilometroj kun monta supreniro! Ĝis 25 kilometroj estas tolereble, sed kiam restas apenaŭ tri-kvar kilometroj, kaj en la valo vi vidas urbeton, kie vi povos enloĝiĝi, ŝajnas ke vi neniam atingos ĝin, aŭ ke la distancoj estis markitaj malĝuste. Dum la unuaj du tagoj vin ne forlasas la penso – kion anko-raŭ eblas forĵeti el la tornistro, sed post mensa traserĉado ekŝajnas, ke restis nur la plej bezonataj objektoj. Estis deziro forĵeti gantojn kaj varman ĉapon, ŝajnis, ke ili ne ekbezonas, sed la matenon de la tria tago, en la montara valo ili eĉ tre utilis.



*Dum unu vojaĝa
mateniĝo*

La tranoktado en municipaj aziloj kostas ekde 3 ĝis 7 eŭroj. Avia kompanio *Ryanair* nin flugigis el Santiago tra Frankfurt al Kaŭno kontraŭ 270 Lidojn. En la kafejoj oni povas satmanĝi kontraŭ 5-6 eŭroj, kafa taso aŭ pokalo da vino kostas unu eŭron, ne necesas aĉeti akvon – laŭvoje estas fontanetoj de bongusta trinkakvo. La loĝkondiĉoj en la aziloj estas – duetaĝaj litoj, iam en la sama ejo dormas ĝis 50 personoj, sed iam ni trovis kvarpersonajn ĉambretojn (la sentivaj dormantoj devas toleri alies ronkado, kaj iam estas devigitaj kun la dormosako translokiĝi al vestiblo aŭ manĝoĉambro). Ĉie estis duŝejoj kaj varma akvo, lav- kaj sekigmaŝinoj estas, tamen

por la ciklo oni devas pagi 3 eŭrojn. Ĉie estas kuirejetoj, sed ne ĉie estas iloj necesaj por manĝopreparo. En iuj aziloj la pilgrimantoj preparis ŝikan vespermanĝon, ĉar al ĉiuj sufiĉis kaj potoj kaj teleroj. La pilgrimantoj el pli riĉaj landoj manĝas en restoracietoj kaj kafejoj, kiuj estas ĉie apud la tranoktejoj. En la pilgrimaj aziloj oni prezentas tranoktadon nur por unu nokto, por sekva nokto resti povas nur malsananto. Oni deziras, ke la azilon oni forlasu ĝis la 8-a matene, tial oktobre ni formarŝadis ankoraŭ antaŭ krepusko. La suno leviĝis nur je duono de la naŭa, tial ni devis lumigi la vojon per lumjetiloj, por ne tragapi vojосignojn. Iam ni renkontis pilgrimantojn, kiuj trapasis duonon de Camino pasintjare kaj ĉi-jare daŭrigis plue la vojon. Ĉiuj pilgrimantoj, kun kiuj ni havis okazon interparoli, certigis, ke la sperto estas mirinda kaj multaj el ili revis pri migrado laŭ aliaj flankvojoj.



*La monumento
por pilgrimanto
en la montaro
sur 1,27- kilometra alto*

Kiam vi estas sur la Vojo, kiam ĝis la vojaĝocelo estas kelkcent kilometroj, kiam via hejmo estas post kelkmil kilometroj kaj via tuta havaĵo lokiĝas en tornistro kaj forestas ajnaj ĉiutagaj sindevigoj, apertiĝas ebleco por ekaŭdi flustron de via animo, por rimarki etajn miraklojn, okazintaj en via vivo, percepti ilin kaj kompreni absurdecon pri stulteta gravigo de eksterajoj.

P.S. Ni tutsincere dankas hispanajn esperantistojn Luis Serano, Jesus Perez, Antonio Marco kaj ĉiujn aliajn, kies bonecon kaj gastamecon ni neniam forgesos, ho, ne ĉies nomojn ni rememoras.

Danutė Statkuvienė, Kaŭno

Leteroj de legantoj*Estimata Vytautas!*

Mi ĵus legis la artikolon „Doloresa Kazragytė. Verkanta aktorino“. Mi la unuan fojon eksciis la nomon, sed mi estis ĉarmita de la virino. Ŝi estas radianta, luma homo. Mi delonge ne legis tian helan publikaĵon. La frazo pri maltrankvilo – galopanta ĉevalo impresis min kaj mi ofte citas ĝin. Rakontojn de Doloresa Kazragytė p. 15-18 (“Litova Stelo”, N 2` 2010) mi legis interne ridetante.

Mi abonis “LS”-on por 2010, sed ĝis decembro ne ricevis la revuon. Mi leteris al peranto de “LS” kaj ricevis el Kaliningrado la revuon “Litova Stelo” N 1-2. Mi ne daŭrigas la abonon por 2011; nun mi estas senlaborulino kaj ne povas pagi la abonon. La revuo “Litova Stelo” al mi plaĉas, ĝi estas simpatia, eleganta, enhavriĉa. La rubriko “Redaktora vorto” estas ĉiam interesa.

Pasintjare la plej helan impreson lasis al mi la libroj “Akbar” de P.A.S. van Limburg Bronwer (Nederlando, 1936) kaj “Vojaĝo al Faremido. Kapilario” (Budapest, 1980), nunjare – la artikolo pri Doloresa Kazragytė kaj ŝia rakonto “33 malfeliĉoj”.

*Bondezire,**Konjašova Svetlana, Samboli – Ĥabarovska regiono; 11.12.2010*

19-a INTERNACIA ESPERANTO – SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO 2011

De la 1a ĝis la 8a de oktobro 2011 en HISPANIO

La 19-a Internacia Esperanto-SEMAJNO de la Kulturo kaj Turismo okazos sub aŭspicio de Hispana Esperanto-Muzeo en la apudamara urbo Malgrat de Mar (provinco de Barcelono) kaj pasos en Hotelo Cartago Nova. Inter ekskursoj, oni antaŭvidas viziton al Sabadell, kie troviĝas unu el la plej gravaj Paleontologiaj Muzeoj. Krome, vi havos la eblecon viziti la straton, kiu estis inaŭgurita “Rondo Esperanto” la 24an de julio en la jaro 1912, laŭdire la unua Esperanto-strato en la mondo. Okazos vizito al la Barcelona Baziliko ktp. Estas enprogramigitaj ankaŭ folkloraj momentoj.

ALIĜKOTIZOJ - Ĝis la 31-a de julio. 20 €, Post la 31-a de julio 30 €, por gejunuloj ĝis 25-jaraj – senpage! La kotizo ne estas repagebla, sed ĝi validos por venontjara “SEMAJNO”

KOMPLETA PENSIONO: 34 € en dulita ĉambro popersono kaj tago kaj 44 € en unulita ĉambro, potage.

KORESPONDA ADRESO:

Luis Serrano Pérez. Apartat 423.
ES-08200 SABADELL (Barcelona).
Hispanujo; Tel. (+34) 93
727.50.21 Rete:
luis_serrano@ya.com;
luis_serrano@mixmail.com




Rememorinte la klubprezidanton de la jaroj 1965-1974 PRANAS SITONIS (1910-1983)

Iuj homoj kvazaŭ sunlumigitaj arboj baniĝas en la lumo de ilia vivtempo, tamen ja necesas varmigi kaj rekonscii la animon de aliaj vivantaj homoj. Tiuspeca lumon en la okuloj de konatuloj ĝis nun jam dum duono da jarcento disradias la bildo de iama gvidanto de Esperanto klubo "Ruto" Pranas Sitonis.

Li estis la preciza laborulo en sia librotenista profesio, individuo kun sentema kaj intelektula animo, fidelece adaptinta Internacian lingvon Esperanto. Ni, *šiaulianoj* (urbanoj de *Šiauliai*, – prononcu: *Ŝjaŭlej – LS*), ĝojas esti fieraj, ke la destino venigis lin al nia urbo, kaj li tri dekjarajn paŝadis kun ni.

Pranas Sitonis naskiĝis la 21-11-1910 en rusa garnizona Kronŝtato (apud S.Peterburgo) en la familio de milit-maristo. En 1912 la familio revenis en Litovion, apud *Žeimelis* (distrikto *Pakruojis*), tamen la I Mondmilito detruis liajn revojn enradikiĝi en la patra lando. La maristo estis devigita reveni en la rusan militfloton kaj poste pereis dum marbatalo.

La junaĝulon Pranas anstataŭ pereinta patro patronadis kaj faris al li grandan influon lia amata avo. Por la scivola knabo Pranas estis malfermita pordo por la lernado: komence en *Žeimelis*, poste en *Kaunas*. En 1930 Pranas komencis militservadon en Litova armeo, post la fino de sia servo li studis en komerca lernejo de *Kaunas* kaj laboris kiel ekonomiisto en la entrepreno „Lietūkis“. En 1939 P. Sitonis komencis studi juron en universitato de Vytautas la Granda. La



II Mondmilito tamen nuligis ĉiujn planojn de la junulo. La studento kun sia familio estis devigita translokiĝi en urbeton *Viekšniai* kaj tie pasigi la milittempon. Al *Kaunas* Pranas ne plu revenis, tamen tie travivantaj jaroj restis por li la plej gravaj kaj memorindaj.

En 1930 Pranas konatiĝis kun la lingvo Esperanto kaj ekamis ĝin ĝis sia vivo fino. En *Kaunas* li amikiĝis kun samaĝuloj B. Gražulis, A. Vebeliūnas (1906-1993),

V. Kalasauskas, A. Poška (1903-1993) ankaŭ aliaj, kiuj restis liaj la plej sinceraj amikoj por la tuta vivo. P. Sitonis estas videbla sur la foto de partoprenintoj de la 1-a Litova Esperanta Kongreso en *Kaunas* okazinta dum 1934.06.29-30.

En 1946 P. Sitonis estis arestita de Soveta sekreta servo *KGB* kaj sen ajna juĝo ekzilita en Komion. En la ekzilo Pranas laboris konstruante fervojon, tamen konstante per raportoj kaj petskriboj apelaciis al Moskvaj justiciaj instancoj pri sia senkulpa arestado. Pro la malsata vivo Pranas ekmalsanis je iktero. Dank' al ekzilita pola kura-cisto li restis viva kaj stariĝis sur siaj piedoj. Al tiu tempo venis el Moskvo la amnesta atesto. Tre ne multajn ekzilitojn vizitis tia sukceso.

En 1948, reveninte en Litovion, Pranas ricevis laboron en Vojkonstrua entrepreno en Mažeikiai. En 1951 la familio translokiĝis al *Šiauliai* kaj tie li restis ĝis la fino de siaj vivotagoj. Laborante kiel ĉefa librotenisto li klopodis pri ekonomika stato de la entrepreno kaj justicaj debatoj, demonstrante altan devokonscion kaj akuratecon.

Kiam la 22-10-1958 en *Šiauliai* okazis refonda kunveno, kiu rekreis la urban Esperanto grupon kaj elektis gvidestraro, kies membro estiĝis P. Sitonis. En 1962 Pranas estis reelektita estrarano.

En 1962 la aŭtoro de tiu ĉi skribaĵo unuafoje vizitis la esperantistan rondetkunvenon. Tie li ekvidis multajn solidajn antaŭmilitajn samideanojn. Inter ili grandan impreson faris la aktiva kaj intelekta preleganto Pranas Sitonis.



Ĉiujaude li informadis la aŭskultantojn de „Viva gazeto“ pri novaĵoj el E-gazetaro aŭ el leteroj de siaj gekorespondantoj, precipe de V. Vladarĉik (Varsovio), L. Jevsejeva (*Riga*), V. Kalasauskas (*Vilnius*), E.Boiklev (Budapeŝto) kaj aliaj. Ekde la 1965 ĝis la 1974 P. Sitonis estis prezidanto de la urba rondeto (ekde la jaro 1968 – E-klubo „Ruto“). En tiu ĉi periodo la E-agado en *Šiauliai* sufiĉe multe vigliĝis. Ĉiujare estis organizataj E-kursoj.

P. Sitonis kune kun la klubaj samideanoj partoprenis en la BET-oj de la jaroj 1963, 1964, 1965, 1967, 1970, 1976. Estus notinde substreki liajn amikajn rilatojn kaj sincerplenan korespondadon kun E-poetino Liudmila Jevsejeva el Riga. Pranas ofte dum la kunvenaj „Vivaj gazetoj“ legis ŝiajn versojn. Junie de 1979 li tralegis jenan salutan strofon de la latva poetino:

*Mi dankas Vin el tuta kor‘
Por la gratula sentesprimo,
Ĝi min stimulas al labor‘
Sur kamp‘ de poezia rimo.*

(L. Jevsejeva)

Por la literaturo (precipe, la litova) Pranas sentis eksterordinaran ŝaton. Estinte bibliofilo, li subtile legadis versojn de litovaj poetoj P. Vaičaitis, Maironis, Vytė Nemunėlis (tiam malpermesita verkisto), interesiĝis pri historio de la arto, kulturo, literaturo. Li mem hejme posedis grandan bibliotekon kaj bedaŭris, ke postmilitempe malaperis la plej valoraj ties volumoj.

La aŭtoro rememoras kiel reveninte el fungado Pranas kun la edzino Petronėlė tutan vojon deklamis versojn de litovaj poetoj. Por apudestantoj tio donis grandan plezuron.

En 1976 Pranas iĝis la pensiulo, tamen li ĉiam plu ĉiuĵaude vizitadis E-klubon “Ruto”.

Estis la jaro 1980 kiam malfacila malsano katenis nian samideanon P. Sitonis al la lito; li kapablis ĉion kompreni, tamen ne povis esprimi sin pervorte.

En 1983.02.05 Pranas trankvile estintiĝis por ĉiam. Li estis entombigita en *Ginkūnai*-tombejo (apud *Šiauliai*).

En 1997.10.24 ni, rutanoj, plantis en *Aleksandrija* (apud *Šiauliai*), sur la monteta kverkaro, la memorkverketon al nia tria postmilita klubo prezidanto – al Pranas Sitonis.



Romualdas Rutkauskas

Ĉarma kaj varma itala kongreso



Jam dum kelkaj jaroj mi aŭdis pri sukcesaj finaŭgustaj kongresoj de italaj esperantistoj, mi legis ke ili iĝas pli kaj pli internaciaj, pli kaj pli bone organizitaj kaj kun pli kaj pli riĉa kaj interesa programo. Bonŝanco estis ke la dato de la 77a Itala Kongreso de Esperanto estas konvena por mi kaj mi kun plezuro akceptis la inviton de la organizantoj.

Kiam la aviadilo surteriĝis en aviadilejo de Marco Polo mi samtempe sentis ĝojon pro ebleco reveni al la ĉarma lando, eksciton pro renkontiĝo kun karaj amikoj kaj maltrankvileton pro min atendanta laboro. Malrapide, iom ekskursante kaj kun aventurotoj per la aŭto de franca amiko Claude ni atingis kongresejon en Linjano Orsabra, proksime de Venecio.

Tuj ni vidis, ke ĉio okazos vere tuj ĉe Adria maro, ke temas pri moderna kaj sekura loko kaj ke aliĝintoj estas multegaj, ĉar vico por registriĝi estis impona. Ne estis okazo por nervoziĝi, ĉar unue ni iris vespermanĝi kun la organizantoj kaj poste kombinis la atendadon en vico kun agrablaj babiladoj, salutadoj, interkonatiĝoj kaj eĉ kun koncerto kiu estis ekstere. Al la kongreso aliĝis 332 kongresanoj el 37 landoj kaj kvankam ne ĉiuj povis alveni, tiuj kiuj ĉeestis trovis riĉan kaj varian programon.



Mi ne sukcesis partopreni prelegojn kaj seminariojn, ĉar mi kaj Anna Löwenstein gvidis E-kursojn (vd. la bildojn). De multaj partoprenintoj mi aŭdis pri tre interesaj prelegoj de Katalin Kováts, Zlatko Tišljár, Davide Astori kaj de aliaj laŭ la kongresa temo "Lingvaj rajtoj en la Eŭropa multkultura socio".

Dumkongrese okazis seminario kaj ekzamenoj de Komuna Eŭropa Referenckadro kiujn gvidis Katalin Kováts kaj eĉ 10 kongresanoj ekzameniĝis.

Mia grupo de la kursanoj estis tre ĉarma kaj interesa. Ĉeestis entute pli ol 30 personoj, de diversaj landoj kaj diversaj aĝoj, sed la kerno estis kelkaj fidelaj mezaĝaj italoj kaj 9 italaj gejunuloj kiuj gajnis stipendion de Itala Esperanto Federacio por partopreni en kongreso. Plejparte tiuj gejunuloj lernis per reto kaj nun havis la okazon rekte komunikiĝi kaj plulerni. La lecionoj pasis en bona etoso kaj mi vere ĝuis la laboron kun ili, nur ni dum kelkaj tagoj ne povis ekskursi, ĉar instruis po



ses horojn. Mi kompensis tion restante en la rondo de gejunuloj dum la noktoj kaj mi sincere admiris ilin pro ilia kapablo organiziĝi, pro amikeco, inteligenteco kaj sincereco kiu radiis de tiuj junaj homoj. Mi ege ŝatus foje kun miaj litovaj gelernantoj iri al junulara renkontiĝo de italoj kiun ili tradicie organizas printempe.

Ekskursoj estis vere allogaj: tra Venecio, Treviso kaj Triesta Karsto, tra kelkaj lokoj de la regiono. Mi partoprenis en du kaj precipe plaĉis al mi vizito al granda ŝinkfarejo en la fama por frandemuloj urbo *San Daniele del Friuli*. Ni vizitis ankaŭ vilaojn kaj kelkajn pitoreskajn urbetojn, palacon, do la tuta tago pasis en tre agrabla societo kaj en bona etoso.

Pri kulturaj vesperaj programoj mi nenion rakontu nur donu la liston de la kontribuantoj kaj iliaj nomoj parolos per si mem: Jomo, Mikaelo Bronŝtejn, Ĵomart kaj Nataŝa, Georgo Handzlik, Amir. Vera stelaro, ĉu ne? Tiamaniere vesperaj programoj ĉiam estis tre allogaj kaj kvalitaj, sed mi eĉ pli atendis noktajn petoladojn



Dumekskurse: Graĵina (meze) kun Sara kaj Maksim

organizitajn de italaj gejunuloj sub la gvido de Boris Mandirola. Unu vesperon ili eĉ organizis gustumadon de diversaj italaj specialaĵoj al kiu iom kontribuis ankaŭ ni, eksterlandanoj, per la niaj – naciaj produktoj. Nun mi certiĝis, ke nia ”Zanavykai”, la fumajĵita kunajla kazea fromaĝo havas same bonan sukceson kiel la nia manĝostrangaĵo ”branĉulo”, nur la fromaĝon multe pli facilas kunporti.

Ĉar kongresejo estis tuj ĉe la maro ni profitis la postagmezajn ripozhorojn por sunbruniĝi, naĝi en varma akvo, kaj ekskurseti tra urbeto kiu laŭ etoso similas al nia *Palanga*, ĉar vivas ĉefe de turismo.

Jen tiom da miaj impresoj, sed vi nepre devas ekhavi la viajn jam en alia loko de Italio, en la fama urbo Torino - la unua ĉefurbo de unuiĝinta Italujo. Por ekhavi informojn kaj aliĝi turnu vin al <http://italakongreso.esperantoitalia.it>.

La 78a Itala Kongreso okazos, ekde la 20a ĝis la 26a de aŭgusto 2011. Aŭ ekplanu jam pri nia kuna veno al la kongreso en 2012 kiu estos en Sicilio!

Graĝina Opulskienė



"BAZA ESPERANTA RADIKARO" REAPERIS

Unu el la plej furoraj eldonaĵoj de UEA, "Baza Esperanta radikaro", estas de-nove havebla! Tiu ĉi verko de Wouter F. Pilger (1942-2006) estas kvazaŭ miniatūra PIV, per kiu oni ne nur lernas vortojn sed ankaŭ ekpensas en Esperanto.



"Baza Esperanta radikaro" enhavas pli ol 2900 radikojn, kiujn ĝi klarigas per kutimaj kaj elementaj Esperanto-vortoj. Post la spertoj kaj komentoj pri la unua eldono, Pilger precizigis aŭ plilarĝigis ĉ. 850 klarigojn, kaj aldonis 260 radikojn, i.a. pri la homa korpo, sano kaj malsano, bazaj nutraĵoj, hejma tekniko, kaj bestoj kaj plantoj. Ĉe multaj kapvortoj li menciis pliajn signifojn aŭ signifo-nuancojn, aŭ aldonis memor-helpajn detalojn kaj ekzemplojn de kunmetaĵoj.

Akademiano Boris Kolker, kiu aŭtoris alian furorlibron, "Vojaĝo en Esperanto-lando", karakterizis la vortaron de Pilger:

"Tiu ĉi simpla Esperanta-Esperanta vortareto estas trezoro por komencintaj kaj daŭrigantaj esperantistoj. Ĝi kutimigas pensi rekte en Esperanto kaj rapide progresi en libera rego de la lingvo."

Kvankam la nova eldono havas 10 pliajn paĝojn, entute 169, kaj aperas naŭ jarojn post la unua, ĝia prezo plu restas 7,50 eŭroj. Ekde 3 ekzempleroj oni ricevas rabaton de 1/3. Al la prezo aldoniĝas la kutimaj sendokostoj kaj, por klientoj en Eŭropa Unio, imposto de 6%.

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 402, 2010-11-23

LA LITOVA LINGVO ELTENIS RIVALADON KUN LA POLA

Laŭ la datenoj de Litova Statistika departemento en la jaro 2009 en Litova Respubliko loĝis civitanoj de 109 naciecoj. Dominantoj estas litovoj; ili konsistigas 84 % de la loĝantaro. Ankaŭ la litova lingvo restas dominata, des pli, ke ĝi estas la sola ŝtata lingvo de la Respubliko. Al la litova lingvo, unu el la plej antikvaj Eŭropaj lingvoj, ŝajnas jam ne plu serioze minacas iu alia pli potenca lingvo. Tamen tiel estis ne ĉiam.


La danĝero pri malapero por la litova lingvo kaj sekve por litovoj, kiel uzantoj de ĉi tiu lingvo, maturiĝis en fino de XIX jarcento. Tutmonde grava germana lingvisto A. Bezenberger en 1879 konstatis: “La litova lingvo, kiu estas unu el la plej gravaj por lingvistiko, rapide malaperas. Samtempe subpremata de la lingvoj germana, pola, rusa ĝi jam ne plu longe ekzistos. Kune pereas ankaŭ eksterordinara popolo, kiu iam regis en norda Eŭropo, kune pereas ankaŭ moroj, fabeloj, pereas ankaŭ popola poezio”.

Estas komprenebla influo al la litova flanke de la germana lingvo – en Litovio Minora litovojn draste germanigis la potencoj de la germanaj ŝtatoj (Prusio, poste Germana imperio). Same estas komprenebla la rolo de la rusa – ekde la jaro 1795 Litovan duklandon aneksis Rusa imperio, kies caro post la popola ribelo de 1863 malpermesis presadon de litovaj libroj, uzon de la litova en ŝtataj oficejoj, malpermesis eĉ la nomon Litovio (anstataŭe oni uzis la nomon Nord-okcidenta regiono de Rusa imperio), sur la litova teritorio litovoj ne rajtis okupi ŝtatajn oficojn. Tamen kiel povis subpremi la litovan lingvon la samsortuloj poloj, kies Pola reĝlando ankaŭ ekde 1795 estis aneksita de Rusa imperio?

En 1840 la cara potenco aboliciis la validintan ekde 1529 Litovan Statuton. Laŭ ĝi poloj ĝis tiam ne rajtis akiri teran proprion aŭ plenumi ŝtatajn oficojn en la Litova duklando. Poloj povis tion ĉi ekposedi nur per geedziĝo aŭ akirinte litovan civitanecon – dank` meritoj por Litovio (ekz. pro persona partopreno en tri militiroj por Litovio). Kompreneble, tiaj poloj ne estis multaj kaj apartenis ne al kamparana tavolo, sed al nobelaro. Vere, jam en mezo de XVI jarcento, en pli grandaj litovaj urboj komencis enloĝiĝi poloj metiistoj, komercistoj, eklezianoj.

La ekdomino de la pola lingvo en publika vivo de Litovio en XVII jarcento ne estis ligita kun ia invado de poloj. Ĝis la mezo de XVII jarcento la pola lingvo, kiel lingvo aristokrata enradikiĝis en vivo de litovaj nobelaj familioj, disvastiĝis inter litovaj bojaroj, fine ankaŭ ilia servistaro iom post iom iĝis polparolanta. En ties rondo oni la litovan parolon komencis taksu malĝentila, malklera! Necesas substreki, ke la plimulton de pastraro kaj de monaĥaro jam delonge faris poloj – ankaŭ tio levis prestiĝon de la pola lingvo. Finfine sen posedo de la pola en Litovio jam ne eblis fari kiun ajn ofican karieron. Rezulte, la domino de la pola dekadence influis la uzadon de la litova lingvo. La limigon de la lingvorajtoj de la litova far de la cara potenco (ekde

1863) subtenis la pola malrespektado. La poliĝinta nobelaro kaj pola pastraro ĉiel instigis litovojn ne plu publike uzi ĝin. Oni asertis, ke ĉio, kio estas litova estas malnobla, naŭza. Nur sole ĉio pola estas nobla kaj fajna. Poliĝintoj (ekslitovoj ja!) fanatiĝinte atakadis tiujn, kiuj publike, en bazaroj aŭ preĝejoj parolis aŭ preĝkantis litove. Nekredeble, sed la polaj pastroj estis netorelemaj lingve, ne kondamnis la apaĉojn – male, ili samkiel Vilna arkiepiskopo Jalbrzyskowski, ĉiel substrekadis ke vera kristano povas esti nur polo (estu do poloj!), ke la Dio (ĉionpova ja!) la litovan lingvon ne komprenas, ĉar tiu estas pagana lingvo. Litovoj estis devigataj viziti nur pollingvajn mesojn. La paroĥestroj ĉiam pli ofte en preĝejoj metrikaj eĉ pure litovajn familinomojn notis en poligitaj formoj, ekzemple la familinomo *Vilkaitis* (*vilkas* – lupu + *ait* – posteŭla sufikso) estis registrita kiel *Wilkoit*, *Giedraitis* (*giedras* – serena) kiel *Giedrojć*, *Mažiulis* (*mažas* – malgranda + *ul* – homa propreco) kiel *Mažul*, *Kiškelis* kiel *Kiszkel* (*kiškis* – leporo + *el* – diminutivo). La totala nompoligo regis ankaŭ sur tombejoj monumentoj de forpasintoj ...



Precipe draste la poligo pasis en orientuda parto de Litovio, kiu oktobre de 1920 estis aneksita de pola militistaro. La pola potenco tiam fermis ĉiujn litovajn lernejojn (krom unu) kaj forigis la litovan lingvon el ĉiuj preĝejoj (krom en unu). Estis fermitaj 462 litovaj organizaĵoj kaj iliaj fakoj. Tiam el la etna Pollando al la okupita Litovio oni venigis kaj loĝigis preskaŭ 200 mil polajn kolonistojn (pole: *osadniki*). Vere, multaj el ili dum la jaroj 1944-1947 repatriiĝis al Pollando. Postrestis, ĝenerale, la litovdevenaj poloj. La papo Joanues Paulus II (Karol Wojtyła) en 1993, dum sia gastado en Litovio nomis la Litoviajn polojn “pol-originaj litovoj”. Tio devus tre malplaĉi al Jalbrzyskowski ...

Laŭ la cenzo de 1989 en Litova Respubliko 6,1 % de la loĝantaro (205,5 mil) estis poloj. Sen kia ajn dubo, multaj el ili estas posteuloj de iam etnaj litovoj... Polaj sprituloj iam ŝercdiras al litovoj – “La plej bona polo estas litovo”. Temas, kompreneble, pri poliĝinta litovo. Tamen ni konstata – la litova lingvo, malgraŭ teritoriaj kaj homaj perdoj, eltenis rivaladon ne nur kun la germana kaj la rusa, sed ankaŭ kun la pola (kiu nun elstaras sur iam ukupaciita sud-orienta tereno de apudvilno). En la mondo potencas la angla lingvo, sed ankaŭ ĝi ne konkeros la litovan.

V. Miklašenas, Vilno

ESPERANTO – MOZAIKO

☆ Dum la jardudeko 1991–2010 **aperis ne malpli ol 4020 libroj** en/pri Esperanto kun la suma paĝonombro 527.892 paĝoj; plej multajn librojn dum ĉi tiu periodo eldonis UEA, sed laŭ la paĝonombro avangardas FEL; plej multaj libroj aperis en Francio, sed pli multe aperis sume en la teritorio de la eksa USSR. Ĉi tiujn kaj aliajn interesajn informojn oni povas legi en la la februara kajero de “La Ondo de Esperanto”, la tradicia revuo de Aleksander Korĵenkov, aperanta en Kaliningrad.

☆ En **lingvistika seminario** okazinta inter la 27a kaj 29a de januaro 2011 en la lingvistika fakto de la universitato de Mumbajo (Hindio), la ferma parolado de prof. Probal Dasgupta (la prezidanto de UEA), traktis la temon de la tradukado kiel esenca ekzistokondiĉo por tia multlingva respubliko, kiel Barato. En tiu kunteksto, la ferma parolado emfazis la rolon de Esperanto kiel unike efika tradukilo kaj krome kiel aparte lucida klarigilo de la semantika strukturo de vortoj, per kiu la homoj povas plibonigi sian komprenon pri la vortosencoj tute ĝenerale. Diference de la kutimaj kunvenoj de lingvistoj, tiun ĉi ĉeestis pluraj membroj de la nacia intelekta elito okupiĝantaj pri la historio, la sociologio, la kulturistiko, kaj la mesaĝo do atingis pli reliefan celpublikon, ol eblis en antaŭaj intervenoj en Barato.

Dum la koridoraj babiloj pluraj gestudentojn proprainiciate lanĉis konversacion pri Esperanto kaj esprimis interesiĝon eklerni. Ili estis direktitaj al la retpaĝaro *lernu.net*

☆ Bulgara Esperanto-Asocio anoncis Internacian Konkurson **HRISTO GOROV – HRIMA**, kiu okazos je ĉiuj tri jaroj. Partoprenantoj – el ĉiuj landoj. La branĉoj: originalaj poezio, prozo, artikolo. Demandoj jam nun, kontribuoj ĝis la 1-a de septembro 2012 al la adresoj e-majla: modest@abv.bg; klasikpoŝta: Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, “Nadeĵda” V, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.



Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos la 14-21.07.2011 en KIJIVO, Ukrainio.

La kongresejo – bazejo “Juna turisto”
La ĉeftemo: “Daŭropova evoluo - nova koncepto por homaro”.

ijk2011@tejo.org ijk-67@ukr.net

RIDETU KUNE!



☺ DOLAROJ AŬ EŬROJ

Juĝisto al akuzato:

— Ĉu vi havas iun alibion?

— Ho, jes! En kiu valuto vi preferus?

☺ ĈU JAM PLENKRESKA?

La infaneco estis la tempo, kiam vi pri ĉiuj viaj malsukcesoj kulpigis viajn gepatrojn. Vi iĝis plenaĝa, ekde kiam vi komencis pensi, ke pri ĉio kulpas junularo.

☺ KOMPARATIVA VIVO

Instruisto istruas al gelernantoj Esperanton, la lingvon facilan kaj flekseblan:

— Hodiaŭ ni lernos komparativon – la gradojn de adjektivo. Jen prenu ni la nocion “bona vivo”. En supereca grado estos – “**pli** bona vivo”, superlative (altgrade) – “la **plej** bona vivo”. Reale funkcias ankoraŭ unu grado, la volativa – “mi vivu **ĉiam same** bone”. Nun, Peĉjo, same kun la esprimo “malbona vivo” komparativu malsuperece!

Peĉjo:

— “Malbona vivo”, “pli malbona vivo”, “la plej malbona vivo”.

Instruisto:

— Kaj nun – volative!

— Vivu vi ĉiam same malbone!

☺ OFERDONO

Prezidanto de E-asocio kunvokis bonstatajn membrojn kaj komencis konvinki ilin pri oferdonoj por riparo de la sidejo:

— Vi nur rigardu kiel aspektas nia kunvendo: la fenestroj estas frakasitaj, tegmento likas, la pargeto pufiĝis, tapetoj detegiĝis, ĉie kotas, la arkivo, la biblioteko pereas ...

La voĉo de el la salono:

— Ĝuste tiel ...

— Kion vi per tio deziris diri, samideano Algimantas?

— Biblioteko!!! Nun mi rememoris, kie mi lastfoje restigis miajn okulvitrojn!

AL PERANTOJ de LITOVA STELO - DANKEGON!

BELGIO: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 ANTWERPEN
 BELORUSIO: Eŭgenija Pečkova, Nadeždinskaja 11-2-23, BY-220006 MINSK
 BRAZILIO: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, BR 70084 – 970 BRASILIA, DF
 BRITIO: Viv O' Dunne, Stacion Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST 12 9DE
 ĈEĤIO: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 PODĚBRADY II
 DANIO: Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK-2100 KØBENHAVN Ø
 ESTONIO: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 KURESAARE
 FRANCO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 PARIS
 GERMANIO: EsperantoLand e. V. Berlin, s-ro Lu Wunsch-Rolshoven,
 Wiciefstrasse 9, DE-10551 BERLIN
 HISPANIO: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 SABADELL
 ITALIO: Višnja Brankovič, Via Parini 5, IT-34129 TRIESTE; tel/fax +39/40/767875
 IRLANDO: Rūta Vaičiūnaitė, DUBLINO, ruta64@centras.lt; tel. +353 8762 78929
 LATVIO: Margarita Želve, Rūpniecibas 35-13, RĪGA LV-1045
 MAKEDONIO: Esperanto-Societo "La Progreso", p.f. 197, MK-7500 PRILEP
 NEDERLANDO: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM
 POLLANDO: Robert Kaminski - ul. Kwiatowa 1 m 3, PL-94-227 LODZ, lodzano@nestrada.pl
 RUSIO: Halina Gorecka, ab. ja. 1248, RU-236039 KALININGRAD
 SVEDIO: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 -35 HÖRBY
 UKRAINIO: Mikaelo Lineckij, av. Heroj Stalingrada 42-v-64, UA-04213, KIEV;
ml@esper.kiev.ua
 USONO: E.L.N.A., Esperanto-USA, 1335, Stanford Ave Suite 300, Emeryville Ca 94608

PERANTOJ ANKAŬ EN ALIAJ LANDOJ ESTIS DEZIRINDAJ!

La revuon *Litova Stelo* vi povis aboni ĉe la perantoj, ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte ĉe Litova Esperanto Asocio (LEA, ab. d. 167, LT-44002 Kaunas-C; litova.ea@mail.lt).

Se vi ĝiris la pagon rekte al nia konto *litv-s* ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 Rotterdam, Nederlando, vi pri tio mem devis informi la prezidanton de LEA (pjedorovas@takas.lt) kaj sendi al li via(j)n adresoj(n).

LA ABONPREZOJ por la jaro 2010 estis malaltaj:

Por Litovio: jarabono 20 Lt; unuopa n-ro 4 Lt; jarkolekto 10 Lt.
 Por landoj de eksa Sovetio: jarabono 7 €; malnova jarkolekto 4 €.
 Por ekssocialismaj landoj: jarabono 10 €; malnova jarkolekto 5 €.
 Por ceteraj landoj: jarabono 14 €; aerpoŝta aldono 6 €;
 unuopa n-ro 3 €; malnova jarkolekto 7 €.

Pro falanta kurzo de USD ni indikis abonprezojn nur en EŬroj.

La abonado senlimdatis! Ricevendis ĉiuj ses numerojn de la jaro!

Lietuvos žvaigždė ISSN 1648-4185 Lietuvos esperantininkų sąjungos žurnalas
 2010 m. Nr.6. Baigta redaguoti 2011.02.24.

SL Nr 797. 2 sp. lankai. Ofsetinė spauda. Tiražas 600. Užs. 10-...

Spaustuvė "MORKŪNAS ir Ko", Draugystės g. 17, LT-51229 Kaunas